

La Riverego

Marto 2020 (speciala eldono) | Jaro 36, No 139-140
Esperanto-Societo Kebekia, kunlabore kun Kanada Esperanto-Asocio
esperanto2020.ca | uea.org/kongresoj/alighilo



Montrealo-2020

La dua aliĝperiodo de la UK en Montrealo plilongigita ĝis 1-a majo 2020 pro la koronaviruso

Estraro de UEA (13-a de marto, 2020)

La Estraro de UEA sekvas la rapide evoluantan mondan situacion de la koronavirusa epidemio, kiun en la 11-a de marto la Monda Organizaĵo pri Sano proklamis « pandemio ». Kompreneble, ĝi havas konsekvencojn kiel flug- kaj enir-limigoj, kiuj forte efikas internaciajn kunvenojn en la proksima tempo, sed la UK ja okazos post pli ol kvar monatoj, kiun la Estraro konsideras sufiĉe sekura tempo-spaco por ne bezoni ŝanĝi la UK-planojn. Similan takson faras ankaŭ aliaj instancoj tutmonde, surbaze de la jam akumulita sperto en Ĉinio kaj Suda Koreio, kie la epidemio estis efektive bremsita ene de ĉ. du kaj unu monatoj, respektive.

UEA intencas do okazigi la UK-n en Montrealo laŭplane kaj konsilas al vi aliĝi, kaj se vi jam estas aliĝinta sed ankoraŭ ne mendis flugon aŭ loĝigon, tion fari, tamen prudente, laŭeble kun nuligo-ebleco kaj aĉetante taŭgan vojaĝasekuron. Nun estas des pli bona tempo por mendi vian

flugbileton, ĉar pro la monda situacio multaj flugkompanioj signife malaltigis la prezojn kaj donas bonegajn nuligo-kondiĉojn.

Tamen UEA konscias ke multaj el vi, kiuj jam aliĝis aŭ konsideras aliĝi ĝis la fino de la dua kotizperiodo, demandas sin ĉu tio estas sekura paŝo kaj volas havi iun garantion, ke vi ne perdos vian monon en la okazo, ke vi devos nuligi, ĉu pro personaj aŭ naciaj neantaŭvideblaj cirkonstancoj. Por doni tiun bezonatan certecon kaj por samtempe kuraĝigi vin utiligi la pli favoran kotizon, la Estraro decidis pri pluraj konkretaj ofertoj por la aliĝantoj, ĝis la menciita limdato :

- La venonta aliĝperiodo komenciĝos unu monaton poste, je la 1-a majo 2020.
- Okaze de bezono nuligi pro personaj kialoj, oni povos transdoni sian kotizon al alia persono, post interkonsento kun la CO.
- Okaze de bezono nuligi la mendojn post la

limdato, oni povos transdoni sian lokon al alia persono, post interkonsento kun la CO.

- Ĝenerale mendoj povas esti nuligitaj (krom administraj kostoj de 15 eŭroj) ĝis la 1-a majo 2020. UEA nun konsideras plilongigi tiun limdaton, depende de traktado kun la UK-hoteloj.

Kanado estas unu el la plej sekuraj landoj, el la koronavirusa perspektivo, je la nuna momento. En la kongresejo estos Esperanto-parolanta kuracisto, kiu sugestos kion fari, en okazo de ajna suspekto. Estas grave, ke via vojaĝasekuro inkluzivu la sanasekuron dum la vojaĝo — Kanado havas bonan sanservon, sed ĝi estas multekosta se oni ne havas sanasekuron. Por tiuj, kiuj ne povos vojaĝi al la UK, UEA planas senprecedence grandan kampanjon por transsendi la kongresan travivaĵon per vivaj elsendoj uzante la interreton. Efektive vi jam de pli ol unu monato povas sekvi

La UK kaj koronaviruso

La LKK kreis la [paĝon](#) por sekvi informojn rilatajn al koronaviruso. Trovu tie la plej ĝisdatajn informojn, ligilojn al la fontoj de ĉiuj oficialaj informoj pri la malsano, komunikaĵojn de UEA kaj de Ŝeraton (la kongresejo). Same kiel ĉiuj

en la Facebook-grupo de UEA raportojn pri la korona viruso. En la lasta raporto, de la 8-a de marto, oni povis legi:

« Pluraj internaciaj E-renkontiĝoj konsideras la eventualan efikon de la epidemia disvastiĝo. Intertempe UEA fidis pri la okaziĝo de la UK en Montrealo, i.a. ĉar laŭ la fakuloj pli varma vetero bremsos la virusan disvastiĝon ». La movadaj aspektoj de la epidemio estis menciitaj ankaŭ en la revuo Esperanto, en la nova rubriko « Fake, Science, Profesie » en la marta numero kaj baldaŭ denove en la aprila.

UEA invitas vin aliĝi kaj veni al la UK en Montrealo, per via fido kaj aliĝo fortigi la Esperanto-movadon kaj mem ĝui la supre menciitajn specialajn avantaĝojn de fruaj aliĝo kaj mendo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA : uea.org/gk/855a1

samideanoj el la tuta mondo, la LKK esperas ke la kongreso okazos kiel planite, sed la situacio rapide evoluas, kaj la sano de la kongresanoj estas nia plej granda zorgo. La kongreso nepre okazu en la plena sekureco por ĉiuj. — Via, LKK

esperanto2020.ca/eo/koronviruso

La Dua Bulteno por Montrealo 2020 haveblas rete

La Dua Bulteno por la UK en Montrealo (1-a ĝis 8-a de aŭgusto 2020) jam haveblas rete! Tio signifas, ke eblas jam mendi ĉiujn servojn rilate la UK-on: loĝadon, ekskursojn, matenmanĝojn kaj bankedon !

La prezoj de loĝado en la kongresa hotelo estas 67 eŭroj (kvar personoj, dulita ĉambro), 83 eŭroj (tri personoj, dulita ĉambro), 107 eŭroj por dupersona ĉambro kaj 215 eŭroj en unupersona ĉambro. Haveblas ankaŭ ĉambroj de nivelo *Club*, kun luksa matenmanĝa kaj vespermanĝa malvarma bufedo (*hors-d'œuvre*) sur la 37-a etaĝo kun belega vidaĵo de la urbo. « Divido de dulita ĉambro inter 3-4 homoj estas certe bonega kaj ne tro kosta opcio, aparte bona por paroj kaj familioj », diras Ĵenja Amis, la LKK-sekretario. Notu, ke eĉ se vi ne loĝos en la kongresa hotelo, vi tamen povos aĉeti matenmanĝon en Sheraton, por pasigi eĉ pli da tempo en Esperantujo (25 eŭroj por bufeda

opcio kaj 13 eŭroj por la skatola opcio). La bankedo (68 eŭroj) inkluzivas diversajn lokajn specialaĵojn, kiel la fama fromaĝo de la urbo Oka, originale produktita de la trapistaj monaĥoj.

La dua plej rekomendinda loĝopcio, post la kongresejo mem, estas junulargastejo *La résidence des Sœurs-Grises* (ankaŭ *The Grey Nuns Residence*). « Tiu ĉi belega konstruaĵo antaŭe estis monaĥinejo de Grizaj Fratinoj (Sœurs Grises) kaj nun estas unu el la plej popularaj junulargastejoj de Universitato Concordia. Konstruita en 1871 kaj plene renovigita en 2007, ĉiuj el ĝiaj pli ol 500 ĉambroj tute pleniĝas somere, dum la festivala



periodo, do mi rekomendas mendi vian ĉambron sufiĉe rapide por havi lokon », konsilas Normando Fleury, prezidanto de la LKK. La junulargastejo havas grandegan korton kaj plurajn komunajn ĉambrojn por vesperaj aŭ noktaj programeroj. La kosto de unupersona ĉambro estas 55 eŭroj, de lito en dupersona ĉambro, 42 eŭroj.

La Montreala LKK lanĉis tute novan ideon: aldone al la kutimaj antaŭ- kaj postkongresoj, oni havas ankaŭ malpli kostan (junularan) version de la antaŭ- kaj postkongresoj. « La junularaj longaj ekskursoj uzos la reton de la junularaj gastejoj kaj havos pli da elekteblaj eroj (liberaj manĝoj, piedaj promenoj kun esperantista gvidanto anstataŭ kun profesiulo ktp.) », diras Suzano Roy, la kunordiganto de ekskursoj. Do, anstataŭ ĉ. 1200 eŭroj por la kutimaj ekskursoj, la junularaj ekskursoj kostos malpli ol 600 eŭrojn : jen belega maniero konatiĝi kun Kanado malplikoste kaj malplilukse, sed samenhave ! La



antaŭ- kaj postkongresoj estas tre kompletigaj : unu iras en la koron de Franca Kanado (inkluzive de la juvela ĉefurbo de Kebekio : Kebeko) kaj la alia iras al Ontario kaj inkluzivas Otavon (la kanadan ĉefurbon), Toronton (la plej grandan urbon en Kanado) kaj jes, kompreneble, la

Niagarajn Akvofalojn ! Multaj bonegaj tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj estos haveblaj, en la prezogamo de 7 eŭroj (piediraj ekskursoj) ĝis 43 eŭroj (kun manĝo en aŭtentika kebekia sukerkabano) por duontagaj kaj 38-87 eŭroj por tuttagaj ekskursoj.

Ĉiuj informoj (aliĝilo, mendilo, Dua Bulteno) troviĝas ĉe <https://uea.org/kongresoj>. Atentu, ke la dua plej favorpreza aliĝperiodo estis prokrastita ĝis la **fino de aprilo 2020**. Bonvenon al Kanado!

(el Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Impresoj pri Montrealo

Duncan Charters, prezidanto de UEA

Mi vizitis Montrealon en Kanado jam trifoje, unue por komuna Esperanto-Kongreso de la Kanada kaj Usona Asocioj, kiun briligis aparte interesa programo kun partopreno de Kajto, kaj due por profesia konferenco de lingvoinstruistoj.

En oktobro mi revizitis la urbon kaj restis dum kvin tagoj en la Kongresa hotelo : kongresejo *Centre Sheraton*, nun posedata de Marriott Bonvoy, por doni mian subtenon al nia venonta Universala Kongreso (UK) kaj konstati precize kion spertos la enloĝantaj Kongresanoj. Mi kunsidis kun la Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) Clay Magalhães, kiu kutime vizitas la Kongresurbon minimume dufoje

dum la preparjaro, kaj alportas mirinde kompetentan organizadon, prudenton kaj flekseblan kunlaboron al sia tasko.



Mia tria vizito konfirmis miajn unuajn impresojn. Montrealo estas la plej kulture interesa urbo kiun mi vizitis en Nord-Ameriko. La aŭtentika bonvenigo al siaj gastoj montriĝis en la sinteno de la ŝoforo, kiun sendis por mi la Montreala Turisma Agentejo. Mi klarigis kial mi venis al Montrealo kaj la Kongreso, kiun mi helpos prepari. Aŭdinte unuafoje pri Esperanto, li ĝentile aŭskultis, perfekte komprenis ĝian logikon, kaj

gratulis min asertante : « Nu, tion ni vere bezonas en nia urbo: mi tiom ĝojas ke vi alvenis por organizi vian Kongreson ĉe ni »! Li aludis al la

fakto ke Montrealo estas unuavice francparolanta (pro tio la amaso da francaj turistoj kiuj serĉas lokon kie senti sin hejme), duavice angleparolanta (preskaŭ ĉiuj kun kiuj mi parolis, estis dulingvaj), kaj trie inkluzivanta dekojn da aliaj lingvoj ĉiutage uzataj kaj aŭskultataj surstrate. La urbo alte taksas sian diversecon, sed ankaŭ konscias pri la dezirindeco de komuna komunikilo.

La hotelo ne povis esti pli en la mezo de la urbo. La flughavena aŭtobuso (kompreneble kun numero 747 – memoru la aviadilon !) alvenas rekte al haltejo tie, kaj post malpli ol kvinminuta promenado oni trovas amason da plej diversaj restoracioj, rapidmanĝejoj kaj trinkejoj, inkluzive grandan kolekton en la « subtera urbo », bone protektita ĉiusezone. Ankaŭ la belan preĝejon por la ekumena diservo. Ankaŭ la hotelon, kie loĝis D-ro



Zamenhof.

Dekminuta promenado alproksimigos vin al pli da diversaj muzeoj, ol vi povis imagi kune, kaj la konstruaĵoj konstante atentigas pri arkitekturaj unikaĵoj. Belaj lagetoj, parkoj kaj universitatoj ankaŭ facile atingeblaj. Kaj fine de la Kongreso la

festivalo de indiĝenaj popoloj, kiu trovis sian hejmon ĝuste en Montrealo (kun inter multegaj kulturaj elpaŝoj procesio de 1 500 dancistoj kaj taĉmentoj el trideko da landoj).

La hotelo mem estas tute praktika pro lastatempa moderniĝo, kaj ĉiuj enloĝantaj Kongresanoj ricevos renovigitan

dormoĉambron. Litoj kaj kapkusenoj aparte komfortaj. Kun danko mi ĝuis la tute logikan banĉambron, kun facile uzebla kransistemo kaj duŝejo ebena kun la planko, kun apogiloj, do tre amikema ankaŭ por tiuj kiuj ne facile moviĝas.

Aersistemo perfekte regebla kaj senbrua post atingo de la dezirata temperaturo. Neniu sono de aliaj ĉambroj. Kafmaŝino, fridujo, en mia ĉambro mikroonda forno. Tre bonkvalitaj manĝoj en la hotelo kaj kompreneble kun granda vario tuj ekstere. Amikemaj, helpemaj deĵorantoj.

Por la Kongreso mem, diversgrandaj salonoj kun sonekipaĵo kie bezonata, la plej granda balĉambro por ĝis 1 500, dividebla en tri partojn tute sonizolitajn (nur muzikon kaj aplaŭdojn oni aŭdetas), alia ĝis 400, aliaj normalaj por kunsidoj kaj bona akustiko. Por atingi la tri etaĝojn, kiujn ni uzos, ses liftoj, ŝtuparoj, kaj ankaŭ rulŝtuparoj. Do tute taŭga por la grandeco de nia UK, kaj tiu komforta kuniĝo de ĉio necesa helpas multe por pliagrabligi nian Kongresan sperton.

Prezroj ĉiuloke emas esti multe pli altaj por la somero, do aliaj hoteloj ne prezentos tiel grandan avantaĝon, ĉar nia kontrakta kosto ne estos pli ol tio, kion mi pagis en oktobro. Krome, feliĉe la kanada dolaro lamas kompare kun la usona, kaj ankaŭ kun la eŭro kaj aliaj valutoj. Do por tiuj, kiuj povas pagi normalajn grandurbajn hotelkostojn, vi ricevos la valoron de elstaraj kondiĉoj por ĝui la Kongreson. Kaj vi helpas al UEA, ĉar se ni atingos nian kvoton de dormoĉambroj, tio multe influos la koston de la Kongresaj salonoj.

Ne timu, tamen se via buĝeto ne permesas tion, ĉar estos aliaj ofertoj de la Kongresa servo de UEA pro tio, ke apud la centro troviĝas aliaj loĝejoj privataj kaj universitataj, malpli komfortaj por la somero sed adekvataj, kiujn ni povis rezervi. Necesas diri ke mi forte impresiĝis per la kreemaj ideoj, tuta sindediĉo, kaj granda laboremo de la nuna LKK.

La reliefigo de la Kongresa temo, la artaj aranĝoj, la ekskursoj, ĉio antaŭeniras kaj promesas vere elstaran kaj memorindan Kongreson kun kelkaj novaĵoj, kaj bona pripensado de la bazaj celoj de UEA kaj la deziroj de la Kongresanoj. Ni celas esceptan kontakton kun la publiko kaj diskonigon de la graveco de nia lingvo, niaj kunlaborantoj, kaj niaj pozitivaj kontribuoj al la mondo. Se vi havas ideojn pri la Kongresa programo, kiu ankoraŭ evoluas, bonvolu indiki ilin en la enketilo, kiun baldaŭ ricevos ĉiuj kongresintoj en Lahtio, kaj se vi ne ĉeestis kaj deziras respondi, petu la enketilan adreson de mi kaj mi tuj sendos. Do mi kore invitas ĉiujn al ĉi tiu tre speciala okazo, por ke ni serioze esploru kiel plej efike kune labori por antaŭenigi niajn celojn, sed ankaŭ festu kaj ĉion ĝuu en idealaj kondiĉoj !

La artikolo unue aperis en revuo Esperanto (decembro 2019)

Helpado dum IKBE : kiel esti « kongresa anĝelo »

Saliko (Finnlando)

Atomo, Kerstin kaj Saliko helpadis dum la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE), aldone al la personaj asistantoj, kiujn la dudeko da blinduloj mem havis kun si. La laboro komenciĝis sabate la 20-an de julio 2019. Atomo akceptis flugintojn en la flughaveno de Helsinko. Kerstin kaj Saliko atendis ilin ĉe kajo 6 en Tikkurila Fervoja Stacio Esperante vestitaj. Ĉiun dekan minuton alvenis trajnoj P kun esperantistoj, ne nur blindaj. Ni gvidis ilin al trajno Z veturanta nur unu fojon hore, aŭ al IC aŭ aliaj trajnoj, se ili havis tian bileton. Oni devis serĉi, de kiu kajo tiuj ekiras.

La stacio Tikkurila estas moderna. Super la reloj kaj kajoj etendiĝas larĝa « stacioponto », kien oni iru per rulŝtuparo aŭ lifto. De tie al via kajo vi iras per alia rulŝtuparo aŭ lifto. Al kelkaj alvenintoj tio

ne plaĉis, kaj al ni, deĵorantoj, tio kaŭzis daŭran kuradon al liftoj kaj rulŝtuparoj. Tial Saliko ĉefe restis ĉe la alvenkajo 6 kaj Kerstin helpis kaj distris la atendantojn ĉe la kajo de la Z-trajnoj. Sur la



stacioponto aŭ en ĝia fino troviĝas bierejo, necesejoj, kafejoj, restoracioj, vendejoj, kien la atendantoj iris por pasigi tempon.

Okazis ankaŭ problemetoj. Unu kongresano forgesis siajn bagaĝojn en la trajno P. La Esperanto-deĵorantoj ne povis solvi lian problemon sen neglekti

la sekvajn alvenontojn. Ni nur sendis la problemulon al Lahtio. Unu blindula paro perdis sian konekton al Lahtio, ĉar Saliko gvidis ilin al punkto C, ne al AB, kie la mallonga Z-trajno haltis. La jam lacaj malbonsanĉuloj devis atendi plian horon.

Kelkaj alvenintoj tre ĝojiĝis vidante E-ĉemizojn kaj verdan E-flageton. Ili volis foti, fotiĝi, nomis nin anĝeloj. Post la kongreso kortuŝita aziano nepre volis danki. Vespere post la 18-a horo ni, deĵorantoj, sentis nin ellacigitaj, soifaj kaj malsataj, preskaŭ malbonfartaj.

En Lahtio ni helpadis dum blindulaj vespermanĝoj en hotelo Grand. Ni metis la manĝilaron kaj akvokruĉojn sur la tablojn de kvardeko de manĝontoj. Post ilia manĝo ni purigis la telerojn kaj manĝilojn per buŝtukoj, por ke restaĵoj ne estu retransportataj al restoracio Kivi, de kie la vespermanĝo venis al Grand. Kerstin rondiradis en la manĝejo, helpopreta, se bezonate, kaj afable interparolema. Ni helpantoj dankas Steleton pro tio ke ankaŭ ni rajtis senpage nutri nin.



Dum la tuttaga ekskurso al Hollola, Saliko interpretadis. Estis korŝire al mi kompreni, ke pri la belo de Vesijärvi-lago, artgalerio, ĝardenoj, pejzaĝoj blindulo ne scias, se oni ne parolas pri tio. En la bieno Kinnari ili rajtis vadi en avenkampo

kaj karesi dombestojn. Unu persono, tuj post tuŝo al aven-paniklo, demandis, kio estas la diferenco inter aveno kaj sekalo. Ne haveblis spiko, kiun li povus palpi kaj flari.

Mian prelegon pri finna kuirarto mi provis ŝanĝi en diskutadon kaj amuzan rakontadon, kun gustumado de rapoj, sekala pano, piimäkakku (sen-ova simpla spicokuko, por kiu oni uzas acidlakton).

Kerstin helpeme disdonis la pecetojn, kaj Ritva donis pizojn kaj frambojn.

La helpado en IKBE instruis al ni multon, kelkfoje donis senton ke ni utilas, sed ni ankaŭ perdis multajn programerojn de la UK-2019.

En harmonio kun la naturo :

Naturmedia bazlernejo studata de Mark Fettes

Minjo Renaud

Il existe en Colombie-Britannique (dans la ville de Maple Ridge) une école primaire publique « environnementale », où les activités se passent principalement dans la nature. Cette école existe depuis huit ans déjà et fait l'objet d'un projet de recherche important, co-dirigé par Mark Fettes, ex-président de l'Association mondiale d'espéranto.

En 2013, Mark Fettes estis elektita prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio dum la kongreso en Rejkjaviko. Mi memoras, ke en tiu momento Suzano Roy malfieris pri la kanada registaro, estrata tiam de ĉefministro Harper. Post la elekto de Mark Fettes, ŝi diris : « Nun mi povas esti fiera kanada virino. »

Lastatempe, iun aŭgustan dimanĉon ĉe Radio-Canada, mi malkovris, ke Mark Fettes ne estas nur



Esperanta eminentulo, sed ankaŭ eminentulo en la scienco pri edukado. Li laboras en la Universitato Simon Fraser en Vankuvero kun instruistoj de multaj niveloj de la eduka sistemo. En sia laboro li serĉas la plej kreivajn metodojn por instrui la lernejan programon, aparte ĉe la Unuaj Nacioj, en maniero orientita al la medio.

La teorio malantaŭ tiu laboro substrekas la rilatojn inter sperto, lingvo,

imago kaj komunumo. En 2003 li ricevis esplorsubvencion de unu miliono da dolaroj por studi edukadon ĉe aŭtoktonaj infanoj. En 2013 li kaj kolego lia ricevis alian milionon por disvolvi publikan bazlernejon centritan je la medio en la urbo Maple Ridge proksime de Vankuvero.

En tiu esploro, Mark Fettes ekzamenas la diferencojn inter lernado per tradiciaj lernolibroj kaj lernado akirita tra spertoj en la libera aero, ekstere. En Maple Ridge, de 2013 ĝis nun, la publika lernejo funkcias ĉefe ekstere. Okdek sep bazlernejoj, de ĉiuj niveloj, kune lernas sen libroj, sen lernejaj konstruaĵoj, nur en la ĉirkaŭa naturo, en parkoj, bibliotekoj kaj publikaj spacoj. Tiel estas por lernantoj kaj instruistoj, de la infanĝardena nivelo ĝis la sepa grado. La infanoj rajtas grimpi sur arboj ĉiun tagon ĉiusezone. La lernejo translokiĝas tri fojojn jare por eviti tro premi la medion.

« Ni estas kiel familio. Ni estas tiom proksimaj, ke



la etuloj ne timas nin, kaj ni povas helpi ilin », klarigas Cassie, unu el la plej aĝaj knabinoj. « La pli aĝaj tute nature prizorgas la malpli aĝajn. Malpli da ĉikanado, pli da komprenemo, jen tio, kio plej gravas por mi », diras Sarah Blair, patrino de tri infanoj.

La instruistino Michelle Bouchard diras : « Ni komencas per la sperto, la ideoj, kaj en tio ni provas alveni al legado, skribado kaj numerado. »

« Ili lernas en tuteca maniero per siaj korpo, spirito, koro kaj animo », komentas la instruistino Ola Cholewa. « La junuloj lernas la fundamenton de matematiko, komercon, interŝanĝojn kaj la valoron de aĵoj »,

diras Christophe Moreno, kontisto, kiu komence dubis pri tiu lernometodo. La instruisto Dave Godfrey diras : « La naturo estas nia ĉefinstruisto. »

Tiu eksperimenta lernejo inspiras multajn homojn



tra Kanado kaj eĉ Usono. Instruistoj el la provinco Nov-Brunsviko de Kanado partoprenis en staĝo en tiu sukcesa lernejo de Maple Ridge, cele al fondado de simila lernejo en ilia provinco.

Estas nun atendolisto de ducent infanoj por tiu lernejo de Maple Ridge.

Miavice, mi fieras malkovri, ke Mark Fettes iniciatis tiel gravan edukprojekton pri la medio, por la bono de la homaro.

Unue aperis en Revuo Esperanto, februaro 2020.

Noto de la redakcio : Venu al la UK-2020 por sperti prelegojn de Mark Fettes ! Mark estas la estro de la Indiĝena Serio, kiu enhavas diversajn prelegojn (interalie, pri indiĝenaj lingvoj), atelierojn kaj diskutojn. La intereso de Mark Fettes estas ligita al la integrado de indiĝenaj scioj kaj perspektivoj en la lerneja programo en Brita Kolumbio, kaj lia ĉefa nuna esplorprojekto kombinas tion kun alproksimiĝo al la naturo kiel en Maple Ridge. Mark Fettes ankaŭ interesiĝas pri la nova iniciato de la provinca registaro de Brita Kolumbio enjuri la principojn de la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

Fontoj :

Informoj pri Mark Fettes kaj liaj esploroj vi trovos [ĉi tie](#) en la paĝaro de Universitato Simon Fraser, Faculty of Education.


La projekto pri la preparolita lernejo nomiĝas « Environmental School Project — Place-Based Imaginative and Ecological Education in Maple Ridge, BC » : vidu [ĉi tie](#).

Tiu lernejo estis priskribita en la elsendo « Désautels le dimanche » de la 25-a de Aŭgusto 2019 ĉe Radio-Canada. Vi trovos [ĉi tie](#) aliajn informojn kaj ligojn pri la lernejo.

Ok indiĝenaj filmoj haveblas en Esperanto !

Ok filmoj de Wapikoni estas haveblaj kun Esperanto-subtitoloj rete ! Wapikoni estas neprofitcela organizo, fondita en 2004 de filmistino Manon Barbeau, Konsilio de Nacio Atikamekw kaj Konsilio de Junaj Indiĝenoj, kiu

helpas al indiĝenaj junuloj fari aŭdio-vidajn kreaĵojn : dokumentfilmoj, animacioj ktp. Atendu lerni pli pri indiĝena arto, filmoj kaj Wapikoni dum la UK-2020 en Montrealo ! Iru al wapikoni.ca rekte ĉe tiny.cc/indighenaj



The screenshot shows the Wapikoni website interface. At the top, there is a navigation bar with the Wapikoni logo on the left and a search bar followed by menu items: FILMS, CINÉASTES, MUSIQUE, ATELIERS, MA LISTE, and EN. Below the navigation bar, there are filters for Nations, Communautés, Genres, and Espéranto (which is highlighted), and Années. A FILTER button is also present. A dropdown menu for 'Date de modification' is visible. The main content area displays a grid of film thumbnails, each with a title, director, and a brief description in Esperanto. The films shown are:

- AITUN (COUTUMES)** by KEVIN BELLEFLEUR (08:00). Description: Josephis et Nashtash, un couple d'ainés de La Romaine, partagent leur savoir de +++
- KITCI NEHIROWISKWEW (LA GRANDE DAME ATIKAMEKW)** by ELISA MOAR (05:17). Description: La gouvernance Alikamekw-Nehirowistiw passe par les femmes et l'harmonie avec le Nitaskinan, le +++
- BATAILLES** by KAREN PINETTE FONTAINE (03:42). Description: À la tombée de la nuit, Karen décide de quitter la fête où une +++
- LE ROI DES OISEAUX** by DONOVAN VOLLANT (03:41). Description: Des oiseaux se réunissent pour choisir leur représentant royal. Le huard et +++
- NOUS NOUS SOULÈVERONS** by NATASHA KANAPÉ FONTAINE (04:12). Description: En un texte inspiré et percutant, la talentueuse poétesse innue Natasha Kanapé +++
- KA MITSHELITAKUESS AUASS (L'ENFANT QUI PLANTAIT)** by ISABELLE KANAPÉ (03:23)
- MEGWITETM (JE ME SOUVIENS)** by CRYSTAL DAWN JEROME (03:26). Description: Une femme se remémore les paysages, les sons
- CALL AND RESPONSE (LA RÉPONSE DE L'ÉCHO)** by CRAIG COMMANDA (05:17)

Surprizaj renkontiĝoj kun samideanoj per Amikumu

Lottie Ericson

Amikumu estas mirinda programo, kiu ne nur helpas esperantistojn ekkoni unu la alian, sed ankaŭ montras kiom da kilometroj (aŭ eĉ metroj) estas inter esperantistoj, kiuj uzas la aplikaĵon. Danke al Amikumu, mi nun havas du novajn amikojn. Antaŭ unu semajno ni kafeumis sidantaj en komforta angulo de ĉarma kafejo en Komokso (Comox), Vankuvera Insulo, Brita Kolumbio. Miaj novaj samideanoj estas...

- Michal Siruček, kiu trovis min pasintsomere. Li tiam loĝis en Vankuvero kaj partoprenis en la NOREKa konferenco septembron 2019 en Viktorio. Pro tio, ke la esperantistoj estas malmultaj en la NOREKa

regiono (Vankuvera Insulo, Vankuvero, Seatlo kaj apudaj lokoj), ni vere bonvenigis Michal-on. Li estas el Ĉeĥio kaj enmigris al Kanado en 2013.



De maldekstre dekstren, Michal Siruček antaŭ sia ruldomo kun la verda stelo de Esperanto, Lottie Ericson kaj Matthew Orlowski.

- Matthew Orlowski, kiu trovis min kelkajn semajnojn antaŭe. Li estas de Saskatuno, Saskaĉevano, kie li studis lingvistikon. Tamen li deziris ŝanĝi profesion kaj transloĝiĝis al Brita Kolumbio. Matthew ekstudas biologion en Nordinsula Kolegio en Kortneo (Courtenay) kaj loĝas kun sia pra-onklino.

Klare, la babilado estis plejparte pri Esperanto kaj pri kiel kaj kial ĉiu el ni lernis ĉi tian mirigan lingvon.

Michal, kiu estis survoje de Insulo Kvadra

(Quadra, oriente de Vankuvera Insulo) al Duoninsulo Ŝiŝalo (Sechelt, norde de Vankuvero) por nova laboro, lernis kaj ankoraŭ lernas per la programo Duolingo. Li komencis antaŭ du jaroj kaj parolas bone, kvankam li malofte havas okazon paroli la lingvon internacian.

Matthew, nun loĝanto de la Komoksa Valo, lernis Esperanton antaŭ pli ol dek kvin jaroj. Sed aŭskultu ĉi tion ! Estis nur la dua fojo, ke li iam ajn parolis Esperanton persone, kaj li jam flue parolis !

Koncerne min, mi loĝas en Viktorio, sed mi ofte vizitas Komokson, ĉar tie loĝas mia partnero. Mi eksciis pri Esperanto, kiam mi havis nur dek ses jarojn kaj loĝis en Svedio. En 1968 mi enmigris al Kanado, sed ne komencis lerni Esperanton ĝis 2007, kiam mi malkovris etan Esperantan grupon en Viktorio. Ni kunvenas plurajn fojojn ĉiujare, do mi havas multe da okazoj paroli. Mi ankaŭ partoprenis en UK kvar fojojn.


Al la demando, kial ni lernas Esperanton, la triopo havas pli aŭ malpli la samajn respondojn. Ni konsentas kun la idealo de Doktoro Zamenhof — esperante ke lia lingvo povas krei pli da paco en la mondo kaj pli da kompreno kaj amikeco inter homoj de malsamaj landoj.

Do vi povas vidi, ke alŝuti la aplikaĵon vere havas avantaĝon. Sed Amikumu kelkfoje eraras ! Ekzemple, Amikumu montris al mi, ke Matthew estas nur cent metrojn for — sed ne, ne, ne ; mi malkovris, ke li estas cent metrojn for birdofluge, t.e. rekte super monteto kaj super multaj tre altaj arboj. Tamen piede aŭ per aŭto la distanco estis mil tricent metroj.

Mi esperas renkonti ambaŭ amikojn denove. Kaj oni povas certe fari spacon por pli da esperantistoj en nia ĉarma kafejo en Komokso. Sendu al mi retmesaĝon al <ttlericson@hotmail.com>, se vi troviĝas apude.

Vizitu Montrealon per Google!

esperanto2020.ca/eo/mapo-2020



L. L. Zamenhof en Ameriko

Multaj legantoj de *La Riverego* scias, ke D-ro L. L. Zamenhof vizitis Montrealon en 1910, ekzakte 110 jarojn antaŭ la UK en Montrealo en 2020—legu [pli en La Riverego 128-129](#) : tie. Unu el niaj fidelaj legantoj, Bruce Crisp, el Otavo, trovis kaj tradukis raran intervjuon de Zamenhof dum lia restado en Montrealo — dankegon, Bruce ! — Red.


Bruce Crisp

Enkonduka noto

Kiel ni informiĝas en la libro *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* kiun verkis Marjorie Boulton, d-ro Zamenhof kaj lia edzino, Klara, vizitis Montrealon kaj la ĉirkaŭaĵon en la jaro 1910 post la 6-a Universala Kongreso de Esperanto en Vaŝingtono. Jen citaĵo el la verko de M. Boulton :

« Post la Kongreso Zamenhof kaj Klara ĝuis postkongresan ekskurson, kiu komenciĝis la 21-an de aŭgusto. Ili vojaĝis per Pullman-vagono (luksvagono) ĝis Buffalo, ĝuante belegajn montarajn panoramojn ; poste, per ekskursvagonaro, al Niagaro. La sekvantan tagon, Zamenhof renkontis kelkajn

familianojn post dudekjara disiĝo : onklinon, s-inon Nathan Lewis ; kuzinon, Helen Lewis, kaj kuzon, Jack Zamenhof, kiu eskortis lin al Montrealo, kie aliaj gekuzoj atendis lin, kaj dudek Zamenhof-familianoj ĉeestis festan vespermanĝon. Tiuj familianoj gastigis Zamenhof kaj Klaran en la Hotelo Windsor. Unufoje ĵurnalisto intervjuis ilin, sed alie ili ĝuis iom da paco kaj ripozo, veturis al la familia somerumejo en Beaconsfield, apud la riverego Sankta-Laŭrenco, kaj ekskursis sur la kamparo. Kelkaj familianoj komencis lerni Esperanton, kaj promesis daŭrigi tiujn studojn. » (citaĵo el : *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* / Marjorie Boulton.



Barlaston : Esperanto-Asocio de Britio, c2017.
Paĝo 248)

La suba artikolo (t.e tiu unufoja intervjuo) aperis anglalingve en la Montreala tagĵurnalo *The Montreal Daily Star* (la 26-an de aŭgusto 1910, paĝo 5). La angla (originala) versio uzas la nomformon *Samenhoff* anstataŭ Zamenhof. En mia Esperanta traduko mi uzas la kutiman formon : Zamenhof. Bonvolu atenti, ke mi ne scias, ĉu iuj asertoj en la artikolo estas ĝustaj aŭ ne, ekzemple, ĉu la unuaj vortoj parolataj en

Esperanto vere estis eldiritaj en la Varsovia domo de la virino, kiu poste fariĝis s-ino Nathan Lewis ? Ĉu d-ro Zamenhof flue parolis ankaŭ la italan ? Oni inkluzivas ĝin en lia lingvoscio laŭ la artikolo, sed ne mencias, ekzemple, la jidan.

Ĉiuokaze, estas interese legi tiun malnovan artikolon – speciale ĉar la Universala Kongreso en 2020 okazos ĝuste en Montrealo. En la artikolo oni ne indikas la nomon de la ĵurnalisto, kiu faris la intervjuon. Laŭ mia scio, la artikolo ne aperis en Esperanta traduko ĝis nun.

La patro de Esperanto estas plena de espero pri ĝia estonteco

**D-ro Ludoviko Zamenhof pasigas kelkajn tagojn en Montrealo vizitante parencojn.
(de *Montreal Star*, 26-a de aŭgusto 1910, traduko de Bruce Crisp)**

Esperanto – la universala lingvo kiu trarompu ĉiujn ekzistantajn mensajn barojn inter la nacioj de la tero – kreskas je rapideco paralela al la spirito de internaciismo, diras d-ro Ludoviko Zamenhof, de Varsovio, Pollando, la inventinto de la lingvo.

D-ro Zamenhof loĝas en la Hotelo Windsor dum kelkaj tagoj vizitante sian onklinon, S-inon Nathan Lewis de la strato Dorchester okcidenta, en kies domo en Varsovio antaŭ 23 jaroj la unuaj vortoj

de la nova lingvo estis eldiritaj.

Al reprezentanto de *The Star* [La Stelo], helpe de sinjoro W. W. Mann, de Londono, kiu agis kiel interpretisto, d-ro Zamenhof asertis, ke la bezono de komuna interkomunikilo gvidis lin konstrui la lingvon Esperanto, pere de kiu viroj kaj virinoj de ĉiuj landoj povus renkontiĝi kaj interproksimiĝi helpe de komuna lingvo.

« La ĉefa karakterizaĵo de la 19-a jarcento », li diris, « estis la faciligo de vojaĝado kaj

transportado per fervojo, vaporŝipo, poŝto kaj telegrafio, kaj tio ĉi eĉ pli efike okazas en la nova jarcento per la sendrata komunikilo kaj aliaj iloj kiuj konstante interligas la naciojn de la tero pli kaj pli proksime. La spirito de internaciismo estas unu el la ĉefaj trajtoj de la nuna epoko, sed la lingva barilo ankoraŭ restas kaj devas esti malmuntita. Ju pli longe la diverseco de lingvoj dividas nacion de nacio, des pli malhelpata estos la progreso de la granda mondo kiel tuto.

Esperanto ne estas, precize parolante, universala lingvo : ĝi estas nur dua lingvo por ĉiuj ; ĝi estas lingvo uzata de homoj de ĉiuj nacioj apud iliaj uzoj de gepatraj lingvoj.

Nia lingvo vivas, kun kreskanta gazetaro kaj propra literaturo, uzata ĉiutage de centmiloj da viroj kaj

virinoj en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi baziĝas sur tiuj vortradikoj komunaj en la plej granda nombro da lingvoj kaj estas facile lernebla kaj de Eŭropanoj kaj de Amerikanoj. La simpleco de la gramatiko kaj ĝia genia vortkonstruado igas ĝin

facila ankaŭ por Azianoj. Post kelkmonata studado de douonhoro ĉiutage, iu ajn de averaĝa inteligento fariĝos kapabla Esperantisto. »

Dum li parolis al sinjoro Mann, la riĉaj, sonoraj tonoj de la vortoj estis facile aprezataj kaj,

vere, eblis preskaŭ sekvi la konversacion sen iu ajn antaŭscio de la lingvo.

Tiu ĉi estas la unua vizito de d-ro Zamenhof al Ameriko, kaj li entreprenis ĝin por ĉeesti la 6-an ĉiujaran kongreson de Esperanto ĉi-jare en



Dum la Universala Kongreso en Vaŝingtono (Usono, 1910)

Vaŝingtono. Proksimume kvarcent delegitoj ĉeestis el 26 diversaj nacioj kaj dek kvin el tiuj sendis oficialajn reprezentantojn.

Ĉe la Barcelona kongreso la pasintan jaron registriĝis ne malpli ol 4200 delegitoj, sed multaj el la Eŭropaj societoj ne povis veni al Ameriko ĉi-jare pro la granda distanco kaj la tempo bezonata por la vojaĝo trans la Atlantiko. Reĝo Alfonso de Hispanujo elektiĝis honora prezidanto de la Kongreso en Barcelono kaj ĉi-jare li sendis personan reprezentanton al Vaŝingtono. La hispana reĝo tre interesiĝas pri la movado kaj li mem estas kapabla leganto de Esperanto.

D-ro Zamenhof multe impresiĝis per tio, kion li vidis ekde sia alveno al Ameriko kaj li asertis, ke li estas konvinkita, ke la estonteco apartenas al la Nova Mondo. La spirito de industrio, li diris, kaj la rimarkinda aktiveco de la popoloj de tiu ĉi kontinento estas aspektoj de la vivo ĉi tie, kiuj ĉefe lin trafis.

Konfeso en Esperanto

La doktoro antaŭ kelkaj tagoj ricevis leteron de romkatolika sacerdoto en Manitobo, kiu parolis pri la avantaĝo de scipovo de Esperanto en la Kanada Okcidento dum sia laborado kun la fremduloj. La lingvo, laŭ skribo de la sacerdoto, estas instruata al

la infanoj en la lernejoj, kaj li ofte aŭskultas konfesojn de sia « ŝafaro » en la nova lingvo.

Ĉie, diris la doktoro, Esperanto gajnas subtenon. La Subŝtato de Marilando ĉi-jare decidis inkluzivi la studon de la lingvo kiel parton de la instruprogramo. En Anglujo ĝi formas parton de la vesperaj lernejoj kaj sur la kontinento de Eŭropo ĝi estas ĉie rekonata.

D-ro Zamenhof flue parolas la polan, la rusan, la germanan, la francan, la italan kaj la hebrean lingvojn kaj estas karakteriza tipo de Eŭropa klerulo. El lia kvieta konduto brilas la entuziasmo de iu kiu kredas pri la fina sukceso de sia afero, kiu, je la kazo de la disvastigo de la Esperanto-movado, estas afero neniel kaprica kaj ĉiel bazita sur la idealo de universala gefrateco.

Dum li restas en Montrealo, d-ro Zamenhof estas la gasto de s-ino Lewis kaj lia kuzo, s-ro Louis Zamenhof de Kebekio, kiu lin gastigas ĉe la Hotelo Windsor.

S-ro Mann, kiu akompanas lin, estas la redaktoro de *The British Esperantist*.

(Tiu ĉi artikolo unue aperis en Revuo Esperanto, decembro 2019)

Kie loĝis Zamenhof en Montrealo ?

Jenja Amis

Ĉu vi sciis, ke la hotelo, en kiu en 1910 restis Zamenhof post la 6-a UK en Vaŝingtono dum privata familia vizito al Montrealo — hotelo Windsor — situas 270 metrojn de nia kongresejo en 2020, hotelo Sheraton ?


Hotelo Windsor estas proksimume 10 jarojn pli juna ol Esperanto : ĝi malfermiĝis en 1878.

Siatempe ĝi estis unu el la plej famaj hoteloj de la Brita Imperio : la unua kanada grandhotelo kaj la plej prestiĝa restadloko en la tuta Kanado en tiu tempo. La malferman ceremonion, interalie, ĉeestis John. A. Macdonald, la unua Ĉefministro de Kanado, kaj la membroj de la reĝa familio. Inter la famaj gastoj de la hotelo oni trovas la famegajn aktorinojn Sarah Bernhardt kaj Dolores Costello, verkistojn Mark Twain, Rudyard Kipling kaj Oscar

Wild, kaj la tutan reĝan familion. Multaj lastaj verkoj de la fama kanada verkisto Stephen

Leacock estis verkitaj el la ĉambro de tiu ĉi hotelo.

Dum longa tempo la hotelo estis la centro de la socia kaj komerca vivo de Montrealo : la plej granda kaj prospera urbo de Kanado, la komenca kaj la fina punkto de la kanada fervojo kaj la gravega haveno. Vintre apud Hotelo Windsor oni konstruis la kastelon el glacio, kaj la placo apud la hotelo fariĝis enorma vintra ludejo, ĝuata de montrealanoj kaj




vizitantoj.

En 1906 fajrego detruis grandan parton de la hotelo, sed ĝi ne malbonigis la reputacion kaj popularecon de la hotelo — la fajrego tamen instigis grandan renovigon kaj grandigon de la hotelo, kun aldono de granda norda parto (*North Annex*) : la kvanto de la ĉambroj grandiĝis de 368 al 750. Post tiu renovigo la hotelo okupis la tutan stratblokon !

En 1957 fajrego detruis trionon de la hotelo, kaj la originala konstruaĵo devis esti forigita. Tamen, la norda parto (*North Annex*), kun du balĉambroj kaj 200 hotelĉambroj (aldonitaj en 1908, 2 jarojn antaŭ la vizito de Zamenhof) restis netuŝitaj, kaj la hotelo, en multe malpli granda formo, daŭris dum 25 pliaj jaroj.

En 1987 la hotelo finfine fermiĝis, kaj la ejo renaskiĝis kiel oficeja konstruaĵo nomita : *Le Windsor*. Parton de ĝi nun okupas Desjardins — kebekia financa institucio, kie oni mastrumas havaĵojn de kelkaj milionoj da kebekianoj. Le Windsor konservis plurajn elementojn de la originala hotelo : ekzemple, marmorajn ŝtuparojn, du balĉambrojn (kiuj nun estas luataj por akceptoj, geedziĝoj, konferencoj, ktp.). *Le Windsor* estis plene renovigita en 2006.



Interesa Letero de Doktoro Zamenhof

la usona ĵurnalisto, antaŭ ne longe skribis al la majstro nia, demandante pri kelkaj punktoj de lia personeco.

La genia elpensinto de Esperanto afable respondis per la jena letero, kies la enhavo elmontras la demandojn de la ĵurnalisto:

Mi respondos mallonge viajn demandojn, kiom mi povas.

Mi havas tri infanojn.

Iliaj nomoj kaj aĝoj: Adamo (nask. 1888), Sofio (1889), Lidio (1903). (La du lastaj estas knabinoj.)

Mi naskiĝis la 15an de Decembro, 1859. Mian altecon kaj pezon mi ne scias. (Mi estas malalta kaj nepeza.)

Familia nomo de mia edzino: Silbernik.

Mia bopatro min helpis.

Mi kuracas nur malsanojn de okuloj.

Mi opinias ke mi neniam vizitos Usonon, ĉar mi sentas min ne kapabla por granda mara vojaĝo; ke



Esperanta Kongreso tie iam estos, mi kredas certe.

Usono tre plaĉas al mi, ĉar ĝi apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed al ĉiuj homoj, kiuj loĝas kaj honeste laboras en ĝi. Mi kredas profunde, ke Usono estas la tipo de ĉiuj estontaj regnoj kaj landoj.

La pli granda parto de miaj parencoj ne scias Esperanton.

Mi tre amas poezion kaj muzikon; sed bedaŭrinde la tro okupata tempo tute ne permesas al mi ĝui ilin.

Mian fotografaĵon mi nun ne havas.

Via, Zamenhof.

La doktoro pardonos nin tial ke ni kopias lian leteron, ĉar, kiel li mem konfesas, lia skribmaniero ne estas tute kiel presaĵo, kaj la plimalgrandigo de la skribaĵo ne helpas al la lego de ĝi !

La kvina rimarko estas respondo al demando ĉu la bopatro de l' doktoro helpis lin eldoni lian unuan broŝuron pri Esperanto. La precipa valoro de tiu-ĉi

letero de la majstro estas ke la doktoro neniel konis sian korespondanton, kaj respondis ĝentile al demandoj kiuj eble ŝajnis al li (nekonanta nian tag-ĵurnaliston usonan) strangajn kaj iom tro pripersonecajn, senŝancele.

Kiam Usono havos kongreson esperantistan, la doktoro spertos niajn ĵurnalistoj!

Kara Lektoro!
 Mi respondas kiel longe
 Uzoj, demandoj, kion mi povas
 1. Mi havis tri infanojn.
 2. Adamo (nask. 1888), Sofio (1889),
 Lidio (1903) (la du lastaj estas
 knabinoj)
 3. Mi estis 15/XII-1859. Mi estis
 al leon kaj jaron ni ne sciis
 mi estas malalta kaj ne perla
 4. Tamen nomi de mi estas
 Silbernik.
 5. Mia bozavino nun helpas.
 6. Mi kutacas nur melstangojn
 de oratoj
 7. Mi opinias, ke mi sentas
 miras Usonon, ĉar mi estas
 nun ne kapable por granda
 mara vojaĝo; ke Esperanto.

Rimarku ke la majstro aprobas la vorton *Usono*, pri kio oni sin turnu al la deka paĝo de tiu ĉi numero de The American Esperanto Journal.

Aperis unue ĉe <https://esperanto-usa.org/bulteno/arhivo/1908/41/50-llz/eo>

Kongreso ke venos mi
 vides certe
 8. Usono tre plaĉas al mi, sed
 ĝi apartenas ne al ĉu anĉi de
 gento, sed al ĉu homoj, ĉu
 loĝas kaj honeste laboras en ĝi.
 Mi vides prognoze, ke Usono
 estas la tipo de ĉu volontaj
 agadoj kaj landoj.
 9. ^{ĉu pli granda parto de} ĉu homoj; parencoj ne
 scias Esperanton.
 10. Mi tre amas precion en
 muzikon; sed bedaŭro de la ho
 vras, ke tempo tute ne permesas
 al mi ĉu biter.
 Mi anĉi fotografado mi
 nun ne havas. Uzo
 Danko

Zamenhof dubis, ĉu li iros al UK en 1910

**Ĉu ankaŭ vi dubas ĉu vi venos al Montrealo ? Bone, vi ne estas sola !
Zamenhof ankaŭ dubis ĉu li venos — kaj, fine, li faris — ni esperas vi
faros same, kiel Zamenhof, kaj vizitos la Esperanto-ĉefurbon-2020 !**

El Arkivo de Usona Esperantisto :

En 1908, EANA (Esperanto-Asocio de Norda Ameriko) sendis leteron al d-ro L. L. Zamenhof, invitante lin al la unua nordamerika UK (kiu estis okazonta en Vaŝingtono en 1910). Zamenhof dubis, ĉu li povos veni. Li estis tiam malsana kaj malriĉa, kaj longa vojaĝo for de lia medicina praktiko estus por li tre malfacila. Sube aperas lia respondo, unue eldonita en la decembra numero de Amerika Esperantisto en 1908.

Kiel ni scias, malgraŭ la grandaj defioj d-ro Zamenhof ja vojaĝis al Nordameriko, kie li ĉeestis la UK-on en Vaŝingtono kaj poste eĉ vizitis Montrealon – la urbon, kiu gastigos la ĉi-jaran Universalan Kongreson, 110 jarojn poste. Ĉu ankaŭ vi venos al Montrealo ? Kial ne? Imagu, malkiel d-ro Zamenhof, vi eĉ ne devos atendi pli ol semajnon surŝipe por atingi ĝin !

Varsovio, Dzika No. 9, 20-X-1908

Al Sro. Edwin C. Reed, Sekretario de la Esperanto Association of North America.

Kara Sinjoro:

Mi ricevis vian leteron de 20-IX. Al niaj Amerikaj samideanoj vi povas sciigi ke mi promesis al Sroj. Forman kaj Privat ke mi penos veni al la Esperantista kongreso en Ameriko kaj mi certe faros ĉion, kion mi povos, por plenumi mian promeson. Sed diri jam nun kun plena certeco ĉu mi povos veni nun estas ankoraŭ ne eble, ĉar la afero dependas de kelkaj cirkonstancoj, kiujn mi nun ne povas ankoraŭ antaŭvidi.

Antaŭ ĉio ĝi dependas de la stato de mia sano. En la nuna tempo ĝi bedaŭrinde ne estas tre bona; mi tamen esperas, ke ĝis la somero ĝi denove resaniĝos kaj mi povos entrepreni la grandan vojaĝon.

Grandaj vojaĝoj kaj longa restado for de mia hejmo estas por mi afero tre malfacila, ĉar tio ne sole estas ligita por mi kun grandaj elspezoj, kiuj por mi estas sufiĉe senteblaj, sed ĝi devigas min por kelka tempo forĵeti mian medicinan praktikon (t.e. la fonton de miaj enspezoj) kaj – kio estas la plej grava – ju pli longe mi restas for de mia hejmo, des pli ruiniĝas mia medicina praktiko, ankaŭ por poste. La Amerika Kongreso postulus de mi ne sole pli grandajn elspezojn ol la aliaj kongresoj, sed ankaŭ pli longan restadon for de la hejmo. Vi sekve povas kompreni, ke mi, ne estante riĉulo, povas entrepreni la



Zamenhof en 1910

Amerikan vojaĝon nur en tia okazo, se montriĝos, ke mia veno Amerikon estas efektive tre grava por nia afero.

Tial mi devas atendi kelkan tempon ĝis mi sciĝos pri la karaktero, kiun la Amerika kongreso esperas havi. Kiam la Konstanta Komitato de la Kongresoj (kies prezidanto estas generalo Sebert) sciigos min, ke via kongreso estas preparita bone kaj ke ni povas atendi de ĝi grandan sukceson por nia afero, tiam mi uzos ĉiujn miajn fortojn por nepre veni al la kongreso.

Via,
—Zamenhof

Korespondi deziras

Karaj Kanadaj gesamideanoj, saluton !
Mi estas esperantisto en Senegalio kaj deziras ekrikti, amikiĝi kun vi por ligi daŭran amikecon. Kio povas esti pli bona ol amikiĝi kaj renkontiĝi. Iam mi estos tre feliĉa viziti vin en via lando, aŭ akcepti

vin en mia lando. Loĝejo, manĝaĵo estos tute senpaga. Studentoj, turistoj kaj aliaj personoj ne-esperantistaj estos bonvenaj. Ne hezitu skribi al mi.

Kontakto:

swoudji55 (ĉe) yahoo.fr | Fejsbuko : kossiwooudji |
tel. 00221 77 315 21 49 Dakar

Kolonoj de la Kanada Esperanto-Movado

Zdravka Metz

Mi transprenis la taskon esplori pri esperantistoj, kiuj dum la lastaj cent jaroj aktivis en la kanada movado kaj helpis nian esperantan agadon plu vivi.

Pluraj membroj helpis en la kreado de Wikipedia artikolo pri la temo, kaj en la ampleksigo de la Wikipedia listo de kanadaj esperantistoj, kaj mi elkore dankas ilin. Mi trovis bazajn informojn ĉefe el tiuj du fontoj, sed mi rimarkis etajn erarojn en iuj naskiĝjaroj, mortjaroj aŭ naskiĝlandoj. Do oni povus korekti tion. Volonte mi informus iun, kiu bonvolus fari tiujn korektojn en Vikipedio, ĉar mi mem ne scias, kiel fari tion.

Mi ricevis kelkajn proponitajn nomojn, sed mi aldonis tiujn, kiujn mi mem konis, vivante de jaroj en Montrealo.

Mi preparis tiujn 15 biografietojn kun bazaj informoj, por ke laŭbezone oni povu uzi ilin por nomoj de salonoj dum la UK-2020.

Mi invitas ĉiujn legi pri tiuj iamaj aktivuloj kaj bonvolu sendi al mi pliajn informojn — se vi

konas, ekzemple, la jaron, kiam la persono esperantistiĝis, kiel li aŭ ŝi studis Esperanton, aktivis en la Esperanto-movado kiel membro de KEA, ESK, UEA... Ĉiam estas interesaj profesio, dato de aliĝo, taskoj, kiujn ili plenumis ene de iu klubo, provinca aŭ landa estraro ; ĉu la persono estis delegito aŭ reprezentanto por sia fako ; ĉu tiu estis honora aŭ dumviva membro ; en kiu lando tiu naskiĝis, se ne en Kanado, kaj eble en kiu urbo aŭ klubo tiu aktivis ; ĉu ŝi aŭ li verkis rakontojn, poemojn, artikolojn por Esperantaj gazetoj.

Kompreneble, se vi rimarkas, ke mi forgesis iun, mi petas, ke vi sendu al mi la nomon kaj biografieton de la persono, por ke mi plilarĝigu la liston. Estas certe, ke tiun liston oni ĉiam povos plibonigi kaj ĝisdatigi.

FRANÇOIS-XAVIER-ISAÏE SOLIS (1832–1903)

Kanadano, maljuna katolika pastro en la seminario de Maskuto (Saint-Hyacinthe) proksime

de Montrealo. Li agadis dum 11 jaroj kaj influis la Esperanto-movadon en Kebekio kaj eble en Nordameriko.

En 1892 (aŭ 1895 laŭ Vikipedio), kiam li emeritiĝis, li eklernis la internacian lingvon. Oni konsideras lin kiel la unuan esperantiston en Kebekio kaj Kanado. Li faris pioniran laboron.

Li ne multe informadis aŭ propagandis pri Esperanto, sed ĉiam respondis, kiam iu demandis pri ĝi. Li simple uzis Esperanton. Li havis la vortaron de Zamenhof de 1894, la revuon Lingvo Internacia 1895–1899, la Jarlibron de 1897. Li korespondis kun René Lemaire, Antoni Grabowski kaj Louis de Beaufront, jam lertaj esperantistoj en Eŭropo.

Li trovis kelkajn personojn kaj instruis al ili la lingvon kaj kreis esperantistojn.

En 1899, pastro Solis batalis por la lingvo, kiam la ĵurnalo La Presse publikigis, la 1-an de aprilo, artikolon de André Theuriet kontraŭ Esperanto ; li, la sola esperantisto en Kanado, vigle respondis la 8-an de aprilo.

Kelkajn semajnojn poste Solis komencis publikigi en Le Courier de Saint-Hyacinthe serion da artikoloj pri Esperanto : kio ĝi estas kaj kio ĝi ne estas. Tio estas nur unu el la multaj agoj de pastro

Solis.

En 1900 Solis tradukis kelkajn kebekiajn rakontojn kaj la romanon *L'Oublié (La Forgesito)* de la franckanada aŭtorino Laure Conan.

En 1901 Solis kun aliaj fondis en Montrealo la grupon Klubo Progreso (kvar jarojn antaŭ iu ajn alia grupo en Kanado aŭ Usono) sub prezido de Solis.

En la sama jaro (kun Pierre Beauchemin) li fondis la revuon *L'espérantiste canadien*, kiu, jaron poste, ŝanĝis sian nomon al *La Lumo*. Tiu estis la unua esperantlingva revuo en Nordameriko. Solis havis kolekton de la revuo *La Lumo* por la jaroj 1901–1902. Ĝi ne estis nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla kaj franca.

ALBERT SAINT-MARTIN (1865–1947)

Saint-Martin profesiis kiel stenografiisto en la Supera Kortumo kaj estis unu el la plej aktivaj esperantistoj en Montrealo inter 1902 kaj 1925.

En 1902, li rapide lernis Esperanton kaj instruis la lingvon tuj, ĉefe en Montrealo kaj Maskuto (Saint-Hyacinthe).

Inter 1902 kaj 1904, Saint-Martin verkis multe kun

Pierre Beauchemin en *La Lumo* sub la plumnomo Albert-Frédéric Rembert.

En 1905 li foriris al Eŭropo kun siaj gefiloj por ĉeesti la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Bulonjo ĉe maro.

En 1905 Saint-Martin estis nomumita kiel unu el la membroj de la Lingva Komitato.

Lia naskiĝo en la montreala laborista kvartalo Hoŝelago influis lian vivon : li ĉiam ion faris por laboristoj.


Dum liaj esperantaj agadoj, Saint-Martin estis sekretario en la Laborista Partio, kiu estis fondita en 1904–1905.

En 1906 Saint-Martin paroladis esperante, france kaj angle dum socialista kunveno.

En 1907 (aŭ 1925 ?) li kunfondis la Esperantan Kooperativon por helpi la malriĉajn laboristojn kaj senlaborulojn.

La ĵurnalisto Larivière skribis : « Esperanto estis lingvo jam tre disvastigita en la laboristaj rondoj, ĉar ĝi permesis al laboristoj komuniki trans la lingvaj kaj naciaj limoj. »

Albert Saint-Martin faris prelegojn, instruis Esperanton kaj fondis eldonejon. Li financis la eldonadon de la revuo *La Lumo* dum du jaroj kaj skribis multajn artikolojn pri ŝanĝo de la



Esperanta ortografio.

Unu el la plej aktivaj Esperantaj disvastigantoj en Montrealo, Saint-Martin ankaŭ prelegis multfoje, batalis por la lingvo de la komenco ĝis sia morto.

En 1935 Albert Saint-Martin kunlaboris en la fondo de Laborista Universitato (Université ouvrière), kies arkivo estis sufiĉe detruita de faŝistaj brigadoj.

Ambaŭ gefiloj de Saint-Martin estis aktivaj esperantistoj. Lia filino Berthe eklernis Esperanton tre juna kaj ŝi ĉeestis kunvenojn de Virina Klubo Progreso. Laŭ Vikipedio, ŝi estis « la juna knabino, kiu portas lampon disradiantan la mesaĝon : ‘pri, per, pro, por Esperanto’ sur la kovrilo de la revuo *La Lumo* ». Lia filo Théode estis sekretario de Klubo Progreso.



Lingva komitato 1907 (Vikipedio)

PIERRE BEAUCHEMIN (1869–1952)

Franckanadano, stenografiisto ĉe la Kortumo, Pierre Beauchemin lernis Esperanton de pastro Solis, kun kiu li korespondis. Li estis unu el la pioniroj kaj unu el la plej aktivaj esperantistoj en Kanado, Kebekio kaj Nordameriko. Estis li, kiu instruis Esperanton al Albert Saint-Martin.

En 1901 li kunfondis Esperanto-rondeton Progreso en Montrealo, kies sekretario li estis. Samjare Beauchemin daŭrigis la komencitan propagandon pere de la loka gazetaro. Li kunfondis, kun pastro Solis, la propagandan revueton *L'espérantiste canadien* (kiu poste fariĝis *La Lumo*), la revuon de la kanada

esperantista movado, kaj inter 1902 kaj 1904 s-ro Beauchemin estis ĝia redaktoro. Komence franclingva, la revueto aliformiĝis al pli granda kaj

ilustrita revuo, *La Lumo*.

En 1903 dank' al li (?) aperis en Montrealo angla lernolibro, kiu multe helpis la Esperanto-pionirojn en ilia plua agado.

Baldaŭ sekvis neordinara gazeta pritraktado de la Lingvo Internacia. Multaj atakoj ŝutiĝis sur la pionirojn.

En 1905 Pierre Beauchemin iris al Eŭropo kaj ĉeestis la Unuan Universalan Kongreson en Bulonjo ĉe maro, kaj en la sama jaro (1907 laŭ Vikipedio) li estis nomumita membro de la Lingva Komitato.

FRANÇOIS (FRANK) DE KINDER (1891–1970)

Frank de Kinder estis kunfondinto kaj la unua prezidanto de Montreala Esperanto-Klubo (MEK), en 1962.

Li estis bone konata en la Esperanto-movado de Kebekio kaj Kanado.

En 1967 (la jaro de la famega tutmonda ekspozicio, Expo 67), nome de la Skolta Ligo, li organizis budon pri Esperanto, kiu aktivis dum ses monatoj.

En 1968–69 li okupis vic-prezidantan postenon en

la estraro de Kanada Esperanto-Asocio.

Frank de Kinder sugestis, ke estu speciala Propaganda Komitato, al kiu estis elektitaj Frank De Kinder, Paul Durette, Di Biasio, Peter Laufen. Tiu komitato, prezidata de Jacqueline Riverin, kunvenis ĉiumerkrede ĉe la domo de Frank De Kinder. Tiuj kunvenoj estis sukcesaj.

La filo de Frank, Maurice de Kinder (nask. 1926), same lernis kaj aktivis en MEK (esperantistiĝis en 1966, partoprenis la UK-on en 1969). Kiam la klubo ricevis ejon en Aréna Père-Marquette, li helpis sian patron pri la aktivecoj.

PAUL DURETTE (1900–1972)

Li eniris lernejon por fariĝi Frato de la Karitato en 1912, kaj eklaboris kiel frato en 1916 en Montrealo. En trovita dokumento pri lia frata vivo, estas menciite, ke li emeritiĝis en la urbeto Saint-Sulpice.

Laŭ iu fonto, Durette estus lerninta Esperanton de Solis. Sed tio ne eblas, ĉar Durette naskiĝis en 1900, dum Solis mortis en 1903.

En 1961, li fariĝis pensiulo kaj orgen-ludisto.

En 1962, kiam fondiĝis la Montreala Esperanto-

Klubo, Paul Durette estis ĝia unua kasisto ĝis 1965.

En 1963–1972 li instruis Esperanto-kurson. Li havis la kromnomon « Malmoleta ».

En 1966, li fariĝis la unua diplomito [en Kanado ? en Kebekio ?] por gvidi Esperanto-kurson.

La 1-an de julio 1967 li servis en la unua meso en Esperanto en Montrealo.

En 1971 li fariĝis honora prezidanto de MEK.

En 1972 kadre de merkredaj prelegoj, li prelegis pri historio – li bone konis la historion de Esperanto.

En 1974, kiel kursgvidanto, li preparis la libron Praktika Esperanto, presita kaj eldonita de MEK.

Frato Paul Durette estis tre aktiva en MEK.

Paul Durette skribis leteron al MEK : « Mi donis kurson inter 1963 kaj 1968, pli ol 70 kursanoj ricevis ateston pri lernado. Kiu inter vi ofertas tiom multe da horoj por la movado en unu jaro ? Mi, 300 horojn (10–13 horojn ĉiusemajne dum 6 monatoj). »

Fine de sia vivo, verŝajne en 1972, li publikigis, parte tajpmaŝine-karbpapere, parte multobligmaŝine, tradukon de ses el la kristnaskaj

rakontoj de Louis Fréchette (sub la titolo Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado), kiun tradukon estis farinta Vincent Beaupré, tiama grava esperantista aktivulo en Kebekio kaj Kanado (1914–1984). Tiu traduko, reviziita, estis republikigita, en presita formo, de Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

Frato Durette ankaŭ mem verkis aŭ tradukis rakontojn.

BETTY SALT (1907, Anglio – 1994, Kalgario)

Betty Salt lernis la lingvon en 1961 per koresponda kurso de W. D. Hackett. Ŝi samjare partoprenis la usonan landan kongreson. Spertinte la funkciadon de la lingvo tie, ŝi revenis al Kalgario kaj tuj mem ekinstruis ĝin. Kreiĝis baldaŭ — sub ŝia gvido — Kalgaria Esperanto-Klubo, kiun ŝi daŭre animis dum siaj lastaj tridek jaroj.

Betty Salt estis dum pluraj jaroj kasisto de Kanada Esperanto-Asocio. En 1993 ŝi elektiĝis honora membro de KEA. Ŝi estis dum multaj jaroj kanada ĉefdelegito de UEA.

Betty Salt estis inter la plej grandaj mecenatoj de la E-movado en Kanado kaj aparte de UEA.

Apenaŭ eblas kalkuli la sumon de ŝiaj malavaraj donacoj.


Betty Salt estis dumviva membro de UEA, regula ano de Societo Zamenhof kaj, de 1980, honora membro de UEA.

Tial, ke Kalgario gastigis la Vintrajn olimpiajn ludojn en 1988, Betty Salt financis eldonon de la terminareto *Esperanto : lingvo de la sporto* okaze de Vintraj Olimpiaj Ludoj en Kalgario.

En 1999, omaĝe al unu el siaj plej fidelaj apogantoj, la Universala Esperanto-Asocio eldonis ŝiajn manuskriptojn en la libro *Lito apud la fenestro*, kuniganta senpretendajn kaj belstilajn tekstojn, inter kiuj estas rakontoj, teatraĵetoj, poemoj.

**W. DESMOND (Dez) HACKETT
(1916, Edmontono [Alberto] –
2007, Toronto [Ontario])**

En 1918, kiam li estis dujara, lia familio transloĝiĝis de Alberto al Toronto (Ontario). Li lernis Esperanton dum la Dua Mondmilito per malgranda gramatiko de John Joseph Sussmuth, dum li deĵoris ĉe



radara taĉmento en norda Novlando.

Reveninte al Toronto post la milito, Dez serĉis kaj trovis aliajn esperantistojn.

Li estis sekretario de la Esperanto-Klubo de Toronto.

Li okupiĝis per senlaca agado tra la 50-aj jaroj kaj eldonis la unuan postmilitan Esperanto-bultenon en Kanado.

En 1958 Dez iniciatis la refondon de Kanada Esperanto-Asocio post tiucela referendumo en 1957 inter la kanadaj membroj de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Ĝi daŭrigas la pli frue

ekzistantan samnoman asocion, kiu fondiĝis en 1907 kaj ĉesis funkcii en 1939 pro la Dua Mondmilito.

Li fariĝis la unua sekretario de KEA (1958–61) kaj denove sekretariigis de 1963 al 1964.

En 1962, li estis dua vicprezidanto de KEA.

Dez estis longtempa gvidanto de koresponda Esperanto-kurso.

En 1994 Dez elektiĝis kiel honora membro de KEA pro lia multjara

servado al la Kanada Esperanto-movado.

Dum tri jardekoj li servis kiel unua ĉefdelegito kaj peranto de Universala Esperanto-Asocio en Kanado.

RÜDIGER EICHHOLZ (1922, Germanio – 2000, Ontario)

En 1949 Rüdiger Eichholz fariĝis UEA-delegito en Göttingen, Germanio, sed en 1953 li migris al Kanado kaj de tiam restis kolono de ties Esperanto-movado.

En 1957 li fondis la Magnetofonan Servon de UEA kaj restis ties komisiito ĝis 1991.

En 1959 kun sia edzino Vilma Sindona Eichholz (1926–1995) li malfermis sian domon kiel kulturcentron por esperantistoj.

En 1960 okazis en ilia domo la dua kongreso de la ĵus refondita Kanada Esperanto-Asocio.

Per sia kompanio Esperanto Press, Eichholz presis revuojn kaj informbultenojn de KEA (mem redaktante *Kanadan Esperanto-Revuon* en 1961–62 kaj ĝian posteulon *La Lumo* en 1980), siajn porinfanajn tradukojn *Ni legas bildojn* (1957) kaj *Alko kaj Suna...* (1958), broŝuron pri

Unitarianismo (1958) kaj diversajn librojn. De Vilma, li presis la lernilon *En novan mondon* (1984). Li presis ankaŭ 600-paĝan dokumentaron kompilitan kun ŝi, *Esperanto in the Modern World* (1982).

La geedzoj Eichholz edukis siajn tri infanojn (kiuj nomiĝis Alko, Suna kaj Brila) kiel denaskajn Esperanto-parolantojn.

En 1968, post lia multjara kunlabora kolektado de vort-difinoj, estis eldonita *Slipara vortaro*.

En 1976 Eichholz estis elektita ano de la Akademio de Esperanto. De tiam li estris la sekcion pri teknikaj-fakaj vortaroj kaj, en la komputila epoko, la projekton Perkomputora termino-kolekto (Pekoteko), dokumentaron terminologian. Li allogis ne malpli ol 143 kunlaborantojn al la ega projekto *Esperanta Bildvortaro* (1988).

De 1983 ĝis 1990 li redaktis ses ampleksajn volumojn de *Akademias Studoj*.

En UEA Eichholz aktivis kiel komitatano A por Kanado (1988–92), kaj kiel fakdelegito dum jardekoj, i.a. pri mondfederismo, unitariismo kaj terminologio.

En 1995 s-ro Eichholz elektiĝis honora membro de

KEA.

En la jaro 2000 li donacis al KEA ĉirkaŭ 2000 ekzemplerojn de *Esperanto in the Modern World*, kiuj estis distribuitaj ĉie tra Kanado.


STEVENS T. NORVELL (Jr.) (1923, Usono – 2015, Novlando, Kanado)

Kolektanto kaj prizorganto de la Libraro Ludovika (tiam la plej granda Esperanto-biblioteko en Nordameriko), Stevens (Steĉjo) T. Norvell Jr. eklernis Esperanton en 1938 aŭtodidakte, kiel 15-jara skolto. Sed, en sia vivo, pro profesia laboro li ne havis tempon por Esperanto.

En 1947 li finstudis medicinon dum soldatservo. Kiel konvinkita pacifisto en Usono, li ekloĝis en Kanado en 1950 pro la Korea milito, kaj li tie faris karieron kiel ĥirurgo.

Ekde 1967 li estis membro de UEA.

En 1987, jubilea jaro de Esperanto kaj pro la venonta emeritiĝo, li decidis reveni al Esperanto.



De post tiam li partoprenis en someraj kursoj, ekzamenoj kaj kongresoj. Ekde 1987 Norvell estis ankaŭ delegito kaj konstanta kunlaboranto de la revuo *Monato*.

Ekde 1990 Norvell estis fidela membro de Societo Zamenhof.

En 1992 li emeritiĝis kiel instruisto pri ĥirurgio en la Universitato Dalhousie en Halifakso, kie li ankaŭ gvidis esplorojn, precipe pri melanomo.

Norvell kreis en Kanado tutlandan ekzamenon por novaj ĥirurgoj kaj ĉiujare oni aljuĝas premion kun lia nomo al iu el la superaj ekzamenitoj. Ekde sia emeritiĝo en 1992 li estis Honora Emerita Profesoro de Ĥirurgio.

En 1992, dum la 77-a Universala Kongreso en Vieno, Steĉjo prelegis pri melanomo en la Internacia Kongresa Universitato kaj aktive verkis en Esperanto.

Norvell enplektiĝis en la laborojn

de Universala Medicina Esperanto-Asocio. Lin aparte interesis la medicina terminologio de Esperanto.

Inter 1995 kaj 2001 Norvell estis vicprezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperanta.

En 2001 li reviziis la *Anglan-Esperantan medicinan terminaron*.

En 2002 li kunlaboris pri medicinaj kaj ĥirurgiaj terminojn por PIV.

En 2002 ili fariĝis honora membro de Kanada Esperanto-Asocio.

En 2006 li partoprenis en la *Esperanta-angla medicina terminaro* de Yamazoe Saburoo.

Transpreninte la grandan pri-Esperantan libro-kolekton de Harry Lewis, Steĉjo Norvell evoluigis kaj katalogis ĝin kiel Libraron Ludovikan, por ke ĝi estu plene alirebla al kanadaj esperantistoj.

De 2004 ĝis 2011 li estis redakciano de *Medicina Internacia Revuo*, kies asocio en 2002 elektis lin kiel honoran membron.

En 2005 li fariĝis honora membro de UEA dum la 90-a Universala Kongreso.

Dum siaj aktivaj jaroj en Esperantio, Steĉjo Norvell kvazaŭ gvidis la halifaksan grupeton, kaj kompostis kaj grave kontribuis al la tiama halifaksa gazeteto *Inter Ni*. Li ankaŭ korespondis kun diversaj esperantistoj, helpis kaj gastigis

ilin. Inter ili estis Marjorie Boulton.

ULRICH PAUL RONALD (1925, Germanio – 2008, Montrealo)

Ulrich Paul Ronald naskiĝis en Germanio kaj en 1939 kun siaj gepatroj translokiĝis al Sudafriko.

En la 1950-aj jaroj li elmigris al Kanado kun sia edzino. La paro enloĝiĝis en Roxboro, okcidenta antaŭurbo de Montrealo.

Li fondis kun kelkaj loĝantoj de la okcidenta parto de la Montreala regiono EKOM-on (Esperanto-Klubo de Okcidenta Montrealo).

U. Paul Ronald estis unu el la fondintoj de la postmilita Kanada Esperanto-Asocio. Li servis kiel ĝia prezidanto (1972–76) kaj funkciigis ĝian oficejon kaj libroservon en sia domo dum multaj jaroj.

Kiel membro de UEA, li estis kanada reprezentanto de la Skolta Esperantista Ligo dum multaj jaroj kaj vigla aktivulo en la skolta movado.

Li proponis organizadon de Esperanto-klubo en Montrealo.

En 1962 estis fondita Montreala Esperanto-Klubo (MEK) kaj s-ro Ronald estis ĝia unua sekretario.

En 1966 li fariĝis vicprezidanto de MEK.

En 1967, nome de Skolta Ligo, li prizorgis informan budon pri Esperanto dum la Tutmonda Ekspozicio (Expo-67), kune kun François (Frank) de Kinder.

En 1970, li fariĝis prezidanto de MEK.

Ekde 1982, dato de la fondiĝo de Esperanto-Societo Kebekia, li estis regula membro kaj aktiva partoprenanto de MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo) kaj de OKEMO. Post kiam ĉi-lastaj fariĝis ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto), li ankaŭ partoprenis en ĝi. Kutime li rakontis ŝercojn dum la kultura vespero.

En 1988 li informadis pri Esperanto en Kalgario dum la vintraj Olimpiaj ludoj.

En 1996 Ulrich Paul Ronald elektiĝis honora membro de KEA. Paul Ronald interalie ankaŭ aktivis en Amnestio Internacia.

BRIAN DOUGLAS KANEEN (1935, Manksio – 2012, Vankuvero)

En 1950 Brian Kaneen havis unuan kontakton kun Esperanto sur Manksinsulo, kie li naskiĝis.

En 1955 li unuafoje parolis Esperanton dum brita

militservado en Germanio.

En la 1960-aj jaroj, post enmigrado al Kanado, li ekstudis ĉe la Universitato McGill en Montrealo kaj faris doktorajn studojn ĉe Universitato Cornell (Novjorkio). Tie li aktivis en la loka Esperanto-klubo.

En 1965, d-ro Kaneen ekloĝis en Vankuvero, kie li aktivis kiel membro de Vankuvera Esperanto-Societo, unue kiel sekretario kaj poste kiel multjara prezidanto.

Li okupis postenojn de docento ĉe Universitato Simon Fraser en Burnaby.

Brian Kaneen organizis kaj instruis multajn Esperanto-kursojn, precipe antaŭ la 69-a UK, en Vankuvero, en kies LKK li servis kiel sekretario kaj vic-prezidanto.

En 1997 li elektiĝis honora membro de KEA.

En la estraro de KEA li okupis la postenojn de redaktoro de *La Lumo*, vicprezidanto (1999) kaj prezidanto (2000–2003).

Delonge Brian estis ankaŭ delegito de UEA kaj fakdelegito pri lingvoj en Vankuvero.

Brian Kaneen (ankaŭ konata kiel Brian Ó Cainín) donacis al Esperantic Studies Foundation pli ol duonan milionon da kanadaj dolaroj.

Kebekiaj nomoj en Esperanto

En la preparoj por la UK estas grave rememorigi pri la ĝusta literumo de kebekiaj geografiaj nomoj. Jen utila referenco !

Regionaj nomoj de Kebekio

Abitibi : Abitibio
Pays de l'Érable, Coeur du Québec : Acerio
Beauce : Belcio
Estrie, Cantons de l'Est : Estrio
Gaspésie : Gaspegio
Gatineau : Gatino
Baie-James : Jakob-Golfio
Charlevoix : Karlevezio
Lanaudière : Lanodierio
Vallée du St-Laurent : Laŭrencia valo
Îles-de-la-Madeleine : Magdalena insularo
Bas-St-Laurent : Malsupra-Sankt-Laŭrencia
Mauricie : Maŭricio
Montérégie : Montereĝio
Côte-Nord : Nord-Bordio
Nouveau-Québec : Nord-Kebekio
Nunavik : Nunavikio
Outaouais : Otavio
Saguenay : Saganio
Lac-St-Jean : Sankt-Johan-Lagio
Témiscamingue : Temiskamingio
Ungava : Ungavio

Kelkaj nomoj de lokoj de Kebekio

Baie-Comeau : Bekomo
Beloeil : Belejlo
Chicoutimi : Ĉikutimo
Dolbeau : Dolbo
Dorval : Dorvalo
Drummondville : Drummondvilo
Gaspé : Gaspego
Granby : Granbeo
Hull : Hulo
Iberville : Ibervilo
Joliette : Ĵolieto
Jonquière : Ĵonkiero
Kamouraska : Kamurasko
Kahnawake : Kanaŭako
Québec : Kebeko
Contrecoeur : Kontrekerio
Kuujuaq : Kuĝŭako
Lachute : Laŝuto
Mont-Laurier : Laŭrie-Monto
Laval : Lavallo
Lévis : Levizo
Longueuil : Longejlo

Rivière-du-Loup : Lup-Rivero
Magog : Magogo
Maniwaki : Maniŭako
Saint-Hyacinthe : Maskuto
Matane : Matano
Mirabel : Mirabelo
Montréal : Montrealo
Percé : Perseo
Povungnituk : Povugnituko
Rimouski : Rimusko
Roberval : Robervalo
Rouyn-Noranda : Ruen-Norando
Sainte-Agathe : Sankt-Agato
Sainte-Foy : Sankt-Fido
St-Georges : Sankt-Georgo
St-Jérôme : Sankt-Ĵeromo
St-Jean-sur-Richelieu : Sankt-Johano-ĉe-Riŝeljo
Baie-St-Paul : Sankt-Paŭl-Golfo
Havre-St-Pierre : Sankt-Petro-Haveno
Shawinigan : Ŝaŭinigano
Sept-Îles : Sep-insulo
Sherbrooke : Ŝerbruko
Tadoussac : Tadasako
Thetford-Mines : Tetfordo
Trois-Rivières : Tririvero
Val-d'Or : Valdoro
Valleyfield : Valefildo
Victoriaville : Viktoriavilo

Geografiaj nomoj en Kebekio

**Por lagoj (L), riveroj (R), montoj (M), kaj insuloj (I)
oni uzu adjektivojn.**

Apalaches : Apalaĉa Montaro
Champlain : Ĉamplena (L)
Deux-Montagnes : Du-Monta (L)
Baie d'Hudson : Hudsona Maro
Baie James : Jakob-Golfo
Laurentides : Laŭrenca Montaro
Memphrémagog : Memfremagoga (L)
Mille-Îles : Mil-Insula (L)(R)
Île d'Orléans : Orleana (I)
Outaouais : Otava (L)(R)
Mont-Royal : Reĝa Monto (M)
Richelieu : Riŝelja (R)
Saguenay : Sagana (R)
St-François : Sankt-Franciska (L)(R)
St-Charles : Sankt-Karla (R)
St-Laurent : Sankt-Laŭrenca Riverego
St-Louis : Sankt-Luiza (L)
St-Maurice : Sankt-Maŭrica (R)
St-Pierre : Sankt-Petra (L)
Chic-Chocs : Ŝikŝoka Montaro
Chaudière : Ŝodiera (R)
Ste-Anne : Sankta-Ana (M)
Tremblant : Trema (M)

Medalo por la UK-2020

La LKK por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo volus presi memormedalon de la UK. Tamen, por ke ni ne faru malprofiton, ni devas pli malpli scii antaŭe, kiom da medaloj ni kredeble povos vendi. Se vi interesiĝas pri la aĉetado de tia medalo, bv sendi mesaĝon al Garry Evans, kasisto de la LKK : garryevans@cegmail.com. Ne estos devige aĉeti medalon, sed via mesaĝo donos al ni pli precizan ideon, kiom da medaloj vendiĝos. La medalo estos el polurita arĝentita bronzo, kun diametro de 38 mm, kaj aspektos kiel la ĉi-afiŝitaj desegnaĵoj. Ĝi kostos 60 kanadajn dolarojn (aŭ 45 usonajn dolarojn, aŭ 42 eŭroj) por ĉiu ekzemplero, inkluzive de luksa skatoleteto, plus poŝtaj kostoj (sed sen tiaj kostoj, se vi kolektos la medalon dum la UK). Vi eventuale povos pagi pere de PayPal aŭ al nia UEA-konto.



Kiel aliĝi al la UK-2020 ?

1) Vizitu la retejon uea.org/kongresoj/alighilo

2) Plenigu la retan aliĝilon.

3) Pagu rekte ĉe UEA (kreditkarto, banka ĝiro, UEA-konto aŭ via landa peranto). La landa peranto por kanadanoj estas KEA — Kanada Esperanto-Asocio. Vi povas pagi al KEA per ĉeko, Interac aŭ PayPal en la retejo esperanto.ca. Ĝuu la rabaton por fruaj aliĝoj ! (Vidu la kotiztabelon sube).

Infanoj kaj gejunuloj, naskiĝintaj post la 31-a de decembro, nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj, gasto aŭ grava kontribuanto (laŭ aparta interkonsento kun la organizantoj) aliĝas senpage.

Notu, ke indas membriĝi (70 CAD) por ricevi la rabatan kotizon. Bonvenon al Montrealo!

KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 2019.12.31		ĝis 2020.03.31		ekde 2020.04.01	
	1-a periodo		2-a periodo		3-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas aligitajn membrojn)	190	145	240	180	290	215
2. ne individua membro de UEA	240	180	300	225	360	270
3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	95	70	120	90	145	110
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	145	105	180	130	215	155

Atendu la sekvan eron de Rivereg-er-aro baldaŭ!

Intertempe, helpu al ni reklami la 105-an UK-on dividante tiun ĉi eldonon kun viaj amikoj : en Facebook kaj aliaj sociaj retoj, retpoŝte aŭ legante en via klubo, kaj... jes, aliĝu !

[Aliĝoj : UEA](#) | [Facebook](#) | [Instagram](#) | [LKK-retejo](#) | #Esperanto2020



Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca).

Korektado kaj lingva konsilado : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.

Esperanto-Societo Kebekia : esperanto.qc.ca | Kanada Esperanto-Asocio : esperanto.ca

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2020.04.20

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !

Visitez notre site web !

www.esperanto.qc.ca



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

www.pasportaservo.org

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.